

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO: 67, avenue Gambetta, Paris-20

Poŝtekaj kontoj je nomo de SAT-Paris: Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22, Stockholm n-o 74 153, Zagreb n-o 41448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. Ietero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier »

Esperanto k Sennaciismo

Oni neniam troe diros, ke la ĉefa nuntempa gravo de esperanto estas pli ĝia spirita signifo ol ĝiaj praktikaj servoj.

Lingvo estas institucio. Ĝi signas anecon k devigas aliĝon al difinita societo. Kiam oni studas la historion de la naciismoj dum la 19a k 20a jarcentoj, oni miras pro la decidiĝa potenco, kiun havas en tiu historio la lingva faktoro. Vane oni klopodis pruvi la kontraŭon, citante la svisan ekzemplon. Tiu ekzemplo estas nura escepto. Kiel la romantika filozofio, naciismo estas doktrino de intelektuloj, sed de intelektuloj kiuj ĉerpis la materialon por sia konstruaĵo el la popola vivo k kolektivaj sentoj. Ili idealigas; ili plivalorigas tion, kion ili kredas eltrovi en la pasinto k en la folkloro de la popoloj.

Poste ili konsciigas la popolojn pri tiuj eltrovaĵoj. Kiele ili agas? Ĉiam same: malkovro de iu lingvo aŭ verkado en ĝi; kreado de la popola k nacia skolo; glorigado de arto k literaturo propraj al tiu grupo.

La miriga sukceso de tiu metodo dum jarcento, k en 20 malsamaj landoj, pravas ĝian naturan karakteron.

Oni do pli bone komprenas, pro kio disvastiĝo de sennacieca lingvo jam konsistigas sentan k intelektan revolucion. Estas kutimo konstati, ke la plej viglaj esperantistoj ne celas per sia sindonemo faciligi komercan korespondadon. Tra mil pensmanieroj ili estas fakte liberecanoj, kiuj sin sentas civitanoj de l'mondo.

Ili celas k sukcesas eliri el la naciistaj pensoj k grupoj. Tia agado komencas starigi la homaran patrimon. Rilate al homamasoj, esperantistoj havas la saman sintenon kiel la preparolitaj profetoj de la ideologia naciismo, sed en kontraŭa direkto. Ili laboras por konsciigi la homaron pri la universala unuo.

Estas erare kredi, ke la homaran unuon oni povas kompreni k plene vivi ĉu per juraj rezonadoj aŭ per ekonomiaj k sociaj solidaraj. Tiu unuo estos daŭra nur post naskiĝo de sennacieca kulturo; sed ĉu sennacia kulturo povas ekzisti sen komuna lingvo? Fojon plian aperos la ĉefa valoro de iu lingvo, por enpuŝi profunde en la menso la ideojn, kies esprimilo estas tiu lingvo. Tiaj esperoj ŝajnas nuntempe nuba revado, ĉar Eŭropo estas kvazaŭ markita nor iro al morto, pro akriĝo de la naciismo. Oni ne prijuĝu supraj! La estonta mondo estas ĉiam preparata de fortoj, kiujn oni

Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT

por la agadjaro 1938-39

B) Administracio

BILANCO

AKTIVO:		PASIVO:	
Mono en kaso	46.040,92	Kreditoroj div. el la Leipziga epoko	24.687,34
Materialo, post amortizo	1,—	Kreditoroj: pruntintoj (K-doj kiuj en 1930 ŝtopis la breĉon Moskvan). Saldo	30.941,18
Valoro (reduktita) de la varo	50.000,—	Kreditoroj: presistoj	8.127,04
Debitoroj: klientoj	14.942,67	Kreditoroj diversaj	1.524,48
		Rezervo por Plena Vortaro	30.000,—
		Rezulto de la jaro 1938-39: profito da 31.296,12 minus la deficitado je 1 junio 38: 15.591,57, restas pozitiva kapitalo da	15.704,55
	110.984,59		110.984,59

(Rimarko: la plej granda parto de la Kas-enhavo, fr. 46.040,92, servos tre baldaŭ al pago de PETRO, LETEROJ DE E..LANTI k la Roman-Serio.

KONTO « REZULTO de la jaro 1938-39 »

DEBETO:		KREDITO:	
Elspezoj por luo, asekuro ktp.	2.761,80	Vendo de SAT-varoj k Pl. V. ...	47.867,64
Elspezoj por administrado, inkluz. pagkompenso al la Oficulo	21.222,45	Kotizoj-abonoj	74.552,10
Korespondado	2.051,15	Vendo de S-ULO al kolektivoj.....	56.010,91
Gazetoj: fakturoj de la presisto ...	86.327,18	Breĉo, anoncoj ktp.	13.052,15
Produkto-kosto de la varo vendita.	21.760,23	Perdo-gajno	3.936,13
Rezervo por 3-a eldono de P.V. ...	30.000,—		
Rezulto de la jaro 38-39	31.296,12		
	195.418,93		195.418,93

KONTO « PERDO-GAJNO »

DEBETO: (perdoj)		KREDITO: (gajnoj)	
Likvido de diversaj kontoj	8.676,49	Likvido de diversaj kontoj	12.612,62
Diferenco al konto Rezulto	3.936,13		
	12.612,62		12.612,62

malfacile ĝerme ekvidas. Ni lasu al ili tempon por agi, k tiucele ni ĉiam pli kuraĝe forpelu militon. Tiuj fortoj certe agos en la direkto de la sociaj rilatoj. Tiam en la komenco ili faligos la naciajn barilojn, arkaikaj k aĉigaj. La kreantoj de tiu liberiga revolucio malfacile povas esti izoluloj, perditaj en la amasoj, ĉar la amasoj malfruas ĉe eltrovoj. Tiajn liberecanojn oni trovas en malgrandaj grupoj de samcelanoj. Nur etaj grupoj kapablas pensigi prave. Oni pro tio devas multoblige ilian nombron. Mi estas certa, ke la esperantistoj tre efike helpas al savo de la nuna socio. Ili ne estas vendistoj de sencela, mortplena trankvilo, sed kontraŭe pacemaj pioniroj de l'liberigota homaro.

Laŭ K-do Emeri (Emery), profesoro de la instruista seminario en Liono (Lyon), kiu estas homencanta esperantisto, — tradukis 20.528.

Guste kiam ni ellaboris la 1938-Bilancon, la franca franko pluen faletis! Sekve la ciferoj de la hodiaŭa Bilanco havas ankaŭ nur relativan valoron kompare al tiuj de la antaŭa.

Malgraŭ tio, la bonfarto financa de nia entrepreno estas evidenta, nekontestebla. Fojon plian ni ŝuldas tiun prosperon ĉefe al: a) la gajno lasita de la Brusela Kongreso, 10.928,20 fr., — b) al la Breĉo, fr. 1697,35, — c) al vendo de la Plena Vortaro: neta profito por SAT, — ĉ) kaj, ĉu ni diru?, al la racia k ŝparema metodo aplikata en nia Administrado. Ja, ni insiste ripetas ke nur K-do N.B. ricevas kompenso-pagon por sia laboro, k ke la ceteran laboron faras senpage K-do Banmer. Tre ofte sabaton posttagmeze K-do PIRON, iafoje ankaŭ aliaj K-doj, venas por helpi en diversaj taskoj.

Kiel profetite en 1938, ni finas la jaron glorie, t.e. kun pozitiva kapitalo! Pensu ke:

— en majo 1935 estis deficitado de ffr. 89.686,46
— en majo 1936 estis deficitado da ... 87.888,64
— en majo 1937 estis deficitado da ... 64.127,30

— en majo 1938 estis deficitado da ... 15.591,57
— kaj nu, majo 1939, ni havas plus-
on da 15.704,55
(rimarku la daŭran prosperon de jaro al jaro!)

Tiu favora rezulto ebligas la kreon (jam planitan en 1938) de REZERVO por eventuala reeldono, la tria, (post 1-2 jaroj) de nia PLENA VORTARO. Tiu kreo sin trudis; ja, la «P. V.» estas tiom utila al la esperantistaro, ke ni devas nenion preterlasi, kio certigos ties daŭrigon. Kompreneble tiu unua rezervo da fr.fr. 30.000 neniel sufiĉus por kovri la koston de tiu eldono, sed ĝi estas la unua ŝtupo, aliaj sekvas.

La malapero de Aŭstrio k aliaj merkatoj havis kiel konsekvencon, por ni, la perdon de kreditoj da, nun, fr.fr. 8.676,49.

Nun ni klopodas por movigi nian kapitalon blokitan en Jugoslavio. K-doĵ tieaj penadis, tiurilate, sed sen sukceso ĝis hodiaŭ. Kiu povus helpi?

La « Vendo de Varoj » leviĝis, kompare al 1938, parte pro la debito de la Romanserio; tamen ni diru ke ni konjektis pli bonan rezulton en vendo de la Romanserio. Krome ni esprimu nian miron, ke la esperantistoj ne pli interesiĝas pri valora verko kia « Skizo de Ekonomia Geografio », de Horabin. Cetere, ĉiuj esp. kolektivoj suferas pro la nuna stato; antaŭ nelonge SLEA plendis ekz. pro nelegemo de l'membraro.

Post tiuj bedaŭraj konstatoj ni ripetu, por fini, ke malgraŭ ĉio SAT daŭradas; la grado de ĝia financa termometro situas super nulo, kio ne okazis de post 1930, de kiam senskrupululoj, en Leipzig, provis bankrotigi nin per intrigoj ĉe nia tiama presejo: Tiuj jaroj estis por ni vere amaraj; revenas feliĉe la prospero; de nun la perspektivo estas pli suna, pli bela: ni daŭre paŝadu, same regule k prudente.

Noto: Sub *Eldon-agado* (en parto A de la Raportaro!) bonvolu aldoni: ni re-eldonis dum la jaro « Unua Legolibro » k « Petro » (resp. 2-a k 7-a eldono).

C) REDAKCIO

Ni liveris al niaj membroj k abonantoj de post la kongresmonato (aŭgusto) dum unu jaro 120 paĝojn da *Sennaciulo* (inkluzive *La Lernanto*-n) k 212 paĝojn da *Sennacieca Revuo*. La ritmo de aperado estis tute regula; la 10-an de ĉiu monato aperis *S. Revuo*, la 25-an *Sennaciulo*. La egala formato de ambaŭ gazetoj permesas al kolektantoj de serioj kunordigi ilin en unu sama volumo; krome ĝi montras la interrilatecon de ambaŭ organoj, kies interligo cetere ankaŭ estas indikita per la titola parenceco. Ni ŝatus atingi, ke kiel eble plej multaj K-doĵ kutimiĝu legi k abonati ambaŭ gazetojn, ne konsiderante la plikoston rezultantan el duobla abono. Nur tiu estas vera esperantisto, kiu ofte, ja pli ol unu solan fojon dum monato, havas spiritan kontakton per-gazetan kun la kolektivo. Tion pripensu la K-doĵ, kiuj hodiaŭ kontentiĝas per nura legado de *Sennaciulo*!

Pri la oficiala organo de SAT, *Sennaciulo*, ni notu ienon: Ni sukcesis dum la jaro teni ĝian amplekson je regule 10 paĝoj (inkluzive *La Lernanto*-n) malgraŭ diversaj malfavoraj faktoroj: al la nederlanda F.L.E. ni konsentis liveri ekde januaro la gazeton je malpli alta prezo (helpante tiel en la ekvilibro de la F.L.E.-a buĝeto), malgraŭ malpli granda eldonkvanto kompare kun la antaŭa jaro (ni presigis la lastajn monatojn neniam pli ol 5000 ekzemplerojn). Ankaŭ ni ne povis ricevi kotizojn, abonmonon el Germanio k.a. landoj kun blokita valuto, k tamen liveris plue niajn gazetojn al la antaŭaj fidelaj abonintoj.

Por povi loki, konsidere la disponeblan spacon, la ĉiumonate alfluantan materialon pri la esperantista aktiveco k la vivo de SAT, k por krome disponi spacon por iom ĝeneralaj instruaj temoj havantaj praktikan aŭ moralan valoron por la anaro, ni estas devigataj prezenti tre kompakte la enhavon sur la tri kolonoj de ĉiu paĝo. Vi povis rimarki, ke kelkfoje la abundo da materialo devigis nin « prunti » lokon el

La Lernanto por diversaj necesaj rubrikoj.

Kompense, ni havas la opinion, ke ni atingis, ke ĉiu leganto de *Sennaciulo* povas formi al si sufiĉe kompletan bildon pri la stato de la movado, k plie — pri la spiritostato de la aktivaj (k kunlaborantaj) SAT-anoj. Ankaŭ pri la teritoriaj laboristaj esperanto-asocioj *S-ulo* informas regule, sen perdiĝi en detalojn. Kaj se nia gazeto ne dediĉis tiom da spaco, kiel ekzemple « Heroldo », al la usona filmo, en kiu oni parolas kelkloke esperanton, ni pensas, ke la legantoj de *S-ulo* povis akiri pri tiu afero la plej fidindan k nefalsitan imagon, dank' al niaj informoj k raportoj. Objektiveco restas nia ĉefa zorgo, k, kvankam ardaĵ esperantistoj, ni ne deziras krei en la mensoj iluziojn per troigo en la prezento de iuj sukcesoj aŭ atingoj. —

La Lernanto bezonus pli da inteligenta kunlaborado. Tio signifas, ke ne nur venu manuskriptoj el la vicoj de komencantoj aŭ sin ekzercantaj tradukemuloj, sed de — pedagogoj, lingvistoj k similaj kelkrilate kompetentaj homoj. La ŝercoj k distraĵoj, (anedkotoj, humoro, cerbumaĵoj) devas esti presigeblaj, t.e. havi veran grajnon en la ŝelo. « Cerbosportuloj » klopodu kontribui de tempo al tempo per variaj k ne tro malfacilaj « sportaĵoj ».

Pri *Sennacieca Revuo* ni povas ĉi-jare doni la plej aktivan bilancon. Nia Revuo estis pliampleksigata, plibeligata, kaj ni ne eldonis ĉi-jare numeron je malpli ol 1.200 ekzempleroj, dum lastjare 1050 k 1100 estis la normala eldonkvanto. Tio montras, ke bele prezentata revuo esperantista povas trovi ankoraŭ novajn abonantojn inter la anaro, k kial ne ankaŭ ekster la propraj rondoj?... La provo estas ĉiam farenda. Cetere ni disvastigis kelkajn numerojn (la decembran, la majan) pli larĝakvante, kun la espero plialtigi iom post iom la nombron de la legantaro. Kelkaj K-doĵ en Nederlando konsentis kolportiti *S. Revuo*-n, — tro malmultaj ankoraŭ. Ĉu tio aliloke ne estus ebla? Ĉu ne en Stokholmo, en Londono, en Kopenhago k en diversaj nederlandaj urboj, kiuj eble ne ankoraŭ pensis pri tio? La poekzemplera vendo okazas je prezo ne pli alta ol tiu, kiun pagas abonanto. —

Pri la prezento k la enhavo mem, ni supozas, vi havos ĉi-jare ne multon por plendi aŭ malfavore kritiki. Tre laŭde komentis leterskribintoj nian deziron fari la Revuon kiel eble plej valora por la kleriĝema SAT-ano. Malsama estas la deziresprimoj en kelkaj rilatoj, ekzemple pri la proporcia disdivido de la enhavo laŭ ĝia sociopolitika k literatura flanko. Iuj ŝatus pli da bel-literaturo, aliaj donas preferon al la diskut-rubriko. Sed ni devas observi mezan normon k laŭeble prezenti al ĉiuj ion kontentigan. Pri la nova aspekto, la kolora kovrilo, regas unuanimeco: ĝi estas ŝatata k certe helpas en la disvastigo.

Kolora ne nur estas la kovrilo, sed ankaŭ la enhavo de « S. R. ». Eĉ diverskolora. La diversdendenceco, supertendenceco de SAT ia ne signifas, ke tendenculo ne raitu esprimi sian vidpunkton en tiu aŭ alia artikolo; ĉiu raitu pledi favore al siaj ideoj, al sia koloro. Se tia raito ne ekzistus, la Revuo baldaŭ aspektus kiel statistika aŭ enciklopedia volumo, kvazaŭ cerbo sen animo, ostaro sen karno, « roboto » sen koro. Ne tro kulpigu do la redaktoron, se li lasis en tiu aŭ alia manuskripto la postsignojn de partieca priuŭzado; kelkfoje ĝi estas la sukto mem de iu skribaĵo, k se la tondilo de l'redaktoro fortranĉus tiun aŭ alian frazon, ĝi fortranĉus kun ĝi anstataŭ mortaj branĉoj la radikon. Ni estu toleremaj reciproke, k ni ankaŭ provu esti ne tro mallarĝanimaj. K-do Deĵ kantas en sia « SAT-marŝo »: *Partiul' kun toleremo, jen homuna ideal!* Ĉiu verkemulo pripensu, antaŭ ol li trempas la plumon en la inkuon, ke li estas verkanta ne por parti-gazeto, sed por la SAT-familio.

Kaj ni memorigu ankaŭ pri jeno: Ne ĉio, kio okazas inter la kvar limfostoj de iu lando, ha-

vas ĝeneralan intereson k estas komunikinda al tutmonda legantaro. La kunlaborantoj sendu nur artikolojn bazitajn sur okazintaĵoj, faktoj, spertoj k pruvu, kion ili raportas, per dokumentoj (eĉ bildaj dokumentoj iaforte utilas!). Laŭvortajn tradukojn ili faru kiel eble plej malofte (1), k nur se temas pri vere neordinaraj informoj aŭ sugestoj; prefere ili kompilu siajn verkaĵojn, utiligante valoran materialon, kiun ili trovas en tiu aŭ alia ĵurnalo, revuo aŭ broŝuro.

Fine, super ĉiuj detaloj, super ĉiuj tendencaj ne-interkonsentoj aŭ troigaj konsideroj, ni neniam forgesu la celon de niaj klopodoj, kiu ankaŭ lumas antaŭ ni ĉe la eldonado de niaj gazetoj: ni bone memoru pri la valoro de nia komuna lingvo en la servo de la laborista klaso k de la suferanta homaro, kiu estas luktanta por homa digno k inda vivo. Tiusence ni *praktiku la lingvon!* Niaj revuoj estas vivanta ekzemplo, konkreta pruvo en la manoj de propagandisto pri la *praktika valoro de esperanto* k pri ĝia taŭgeco por ĉiuj fakoj de la homa spirito k civilizo. Grandan parton de sia sukceso SAT sendube ŝuldas al siaj gazetoj, kiuj estas, krom la Kongreso k la individuaj intervizitoj, la sola konstanta interligilo.

(1) Tio ne koncernas la beletristikon k sciencon rubrikon!

El niaj leteroj

En la kampejo de Barkares

... Ĉi tie ni klopodas iqi iom agrabla nian malliberulan vivon. Kaj ni iel sukcesas. Tiam sukceson ni ŝuldas grandparte al niaj klasfratoj-samideanoj, kiuj havigis al ni esperantajjn, francajn k eĉ hispanajn librojn, kantojn k muziknotojn (memoru, ke inter ni troviĝas muzikemaj K-doĵ). Laborado por k per esperanto ja ankaŭ plenigas grandan parton de nia tempo. Nian viglon certe jam rimarkis la ceteraj samsortanoj, kiuj eĉ iom envias nin, ĉar ni havas « ion farendan ». Okazas neniu grava kultur-manifestacio en la kampejo sen nia partopreno. Tial okazis jam diversaj lekcioj pri esp-o k esperantismo, k tial funkcias esp. kursoj tra la tuta kampejo. Bedaŭrinde la kursoj (tiel pri esp-o kiel pri ĉio alia) ne bone prosperas. La kaŭzo verŝajne troviĝas en la ĝenerala malfavora animstato. Nun ni decidis kunveni trifoje semajne anstataŭ nur unufoje. Jes, tiaj kunvenoj estas por ni la plej agrablaj momentoj. Dum ili ni babilas, pristudas lingvajn demandojn, pridiskutas lekaĵojn k eĉ faras interesajn lekciojn esp-lingvajn (hodiaŭ kompetenta K-do parolis pri presarto). Ĉiel ni penas eskapi el la maldolĉa realo...

En la tria sub-kampejo de Aqde

... Nuntempe funkcias 7 kursoj. Tamen ni interkonsentis kunveniĝi la gvidantojn de la kursoj venontan semajnon, por klasifiki ĉiujn lernantojn en kvar-gradaj kursoj, por plej efike utiligi la klopodojn de la plej kapablaj gvidantoj k laŭeble rapidigi la pliprogresintajn lernantojn. Per tio ni provas sekvi la direktojn de l'moderna racia pedagogio. Ankaŭ ĉiujarde ni okazigas esp-ajn vesperojn. Mi ilin proponis k klopodas ilin vigligi, kun la celo klarigi al lernantoj same kiel al plenrajtaj « neŭtralaj » esperantistoj la historian disvolviĝon k sociajn flankojn de la lingvo esperanto; ĉar inter nia kolektivo troviĝas multaj (la plimulto),

kiuj en Hispanio vegetadis en la t. n. « neŭtralaj » grupoj... Tio estas la sola peresperanta laboro, kiun ni povas fari, ĉar ĉe la koncentroj estas tre severe malpermesate « politikumi »...

En Norda Afriko

... Mi enŝipiĝis en Alkante kune kun 1000 aliaj Gek-doj la 19-an de marto 1939 sur karboŝipo « African Trader ». Alveninte Oranon la 21-an de marto matene, la havenpolicestroj malpermesis nian eniron en la haveno. Oni lasis nin sur la ŝipo en la antaŭhaveno dum 33 tagoj, malpermesinte dum tiu tempo ke ni ricevu vizitojn, donacojn ktp de orananoj. Dum 5 tagoj ni nenion manĝis nek trinkis. Poste oni alportis al ni tage por persono (se ni restis ankoraŭ tiaj) po 400 gr. da pano, 50 gr. da hepata pasto k 8 gr. da olesardinoj. Do dum 33 tagoj ni tute ne manĝis nek trinkis varmaĵojn. Ofte mankis al ni trinkakvo. Preskaŭ neniam ni povis lavi nin. Pro tio post la 33 tagoj ni havis jam 200 kazojn da skabio. Ni ĉiuj « dormis » sen kovriloj sur fera ŝip-planko... Nur post 43 tagoj oni lasis nin iom post iom elŝipiĝi, k oni loĝigis nin dum 10 tagoj sur la alven-kajo en tendoj. Depost la 53-a tago mi nun loĝaĉas kun ĉ. mil aliaj K-doj en koncentrojo (5 grandaj malnovaj fermagazenoj senpavimigitaj, en kiuj ni kuŝas surtere unu apud la alia kiel porkoj)... 7363.

Por mildigi suferojn

8. LISTO DE MONDONACOJ

FLE-sekcio Enŝede 5.— fl. ; A. Cuny 40.— ffr. ; Argent. anark. grupo B.Aires (du sendoj) 56,60 pes. ; FLE-sekcio Sidam 1.— fl. ; Cachon 10.— ffr. ; Piron 5.— ffr. ; Deŝuiter 4.— ffr. ; 17056 — 30.— ffr. ; J. Vieyres 7.— ffr. ; V. Pin 20.— ffr. ; Sternberg 1,50 zlot. ; Varsovianoj 28.— zlot. ; W. Rolt 10/— s. ; A. v. d. Graaf 35.— ffr. ; G. J. Worst 5.— fl. ; I. Aström 5 sv. kr. ; A. Roosing 1,30 fl. ; FLE-distrikto sudholanda 6,20 fl. ; Restsaldo hol. « I. B. »-abonantoj 10.— fl. ; Barbry 6.— ffr.

Tiu ĉi oka listo estas multe pli mallonga ol la antaŭaj! Ne forgesu, Gek-d.j, la sorton de la koncentrejoj; ili trege bezonas ankaŭ plue vian helpon; ja ilia sorto estas ĉio al'a ol enviinda. Ni kalkulas plue pri la solidaremo de la SAT-anoj!

GISDATA BILDO PRI LA HELPO DONITA

De la 1-a de nov. 1938 ĝis la 9-a de julio ni enspezisfr. fr. 15.866,05
En la sama periodo ni elspezis (vd. detalojn sube!) 15.075,30

Restas do disponebla, en kaso fr. fr. 790,75
(Kiam aperos tiu ĉi raporto sub la okuloj de la legantoj, tiu saldo estos jam distribuita).

Detaligo de la elspezoj

— Pakajoj de nutraĵoj al Katalunio ĝis fino de jan.fr. fr. 1.493,45
— Mandatoj, ĉu al izoluloj, ĉu al kolektivoj en la koncentroj de S. Cyprien, Argelès, Barcarès, Bram, Vernet, Septfonds, Poitiers ktp. 12.785,40
— Aĉeto de libroj speciale petitaj (por kursoj) 105.—
— Elspezoj por korespondado 392,80
— Poŝtpunoj pro manko de afranko (letero senditaj al SAT; por ĉiu letero ni devis pagi la duoblon de ordinara afranko, t.e. 1,80; ni protestis ĉe la poŝto, sed vane! oni

respondis al ni, ke la poŝtpuno estas regula, ĉar la rifuĝintoj ricevas 2 markojn monate k devas afranki siajn leterojn!) 298,65

Fr. fr. 15.075,30

En tiu bilanco ne prezentiĝas la multaj libroj (donacitaj ĉu de SAT-anoj, ĉu de SAT mem), nek la vestoj, ŝuoj, tukoj, ŝapo ktp, kiujn ni ekspedis.

K-doj subtenintaj la iaman esp. eldonon de « Informa Bulteno » : Pro la fakto, ke nenia kontakto plu ekzistas kun la antaŭaj eldonintoj de « I. B. », mi decidis propra-iniciate, sendi la monon intertempe ricevitan pere de SAT al niaj rifuĝintaj Gek-doj. Mi esperas, ke mi faris nenion riproĉindan.

T. C. Klijn, Oleanderstr. 5h, Amsterdam, N.

19-a Kongreso de SAT en Kopenhago

5-10 aŭgusto 1939

Adreso de la OKK:

Por mono : K-do Svend Iversen, Kastrupvej 292, Kastrup. Poŝta ĝirokonto 47749 (Kopenhago).

Por ĉio alia : K-do Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K.

9-a k lasta komuniko

KOTIZO : Membroj 7 dkr., gastoj 9. Multaj petis malaltigon de la kotizo, ĉar ili povas nur ĉeesti sabate k dimanĉe. Ni decidis duonigi la kotizon en tiu kazo.

LOGADO : Al ĉiuj, kiuj anoncis, ke ili dez. loĝi hotele, ni sendis specialan HOTELMENDILON. Se vi ankoraŭ ne plenigis k resendis, nepre TUJ faru! Sed jam estas tiom malfrue, ke ni ne plu povas garantii la plenumon de viaj deziroj rilate hotelĉambron.

TENDARO : Por tendumantoj loko estas disponebla 2 km de la kongresejo, nome en « Klovermarken ». Tamen unue turnu vin al la akceptejo por havigi danan akompananton.

AMASLOĜEJO : La amasloĝejo estas preta por vi — sed (ni bedaŭras) nur se vi antaŭpagis al la kasisto! Se vi tion ne faris, faru tuj k ni faros nian eblon — Ne forgesu kunporti blanktolan lit-sakon k mantukon. Ĝi estas deviga.

JUNULGASTEJO : La adreso estas Peter Wedelsgade (notu la translokigon!) Ni atentigas, ke dum feria tempo manĝaĵoj ne estas haveblaj en la gastejo. Bicikloj staras senpage en la hejmo. Prezo por tranoktado 0,50 kr. ponokte.

KARAVANOJ : En Francio oni turnu sin al K-do Glodo, 115, Bd. Aristide Briand, Montreuil s. Bois (Seine), k se oni loĝas en departemento « Rhône », al K-do A. Pialla, 58 av. Lacassagne, Lyon. El Nederlando eliros karavano de Roterdamo organizita de K-do Bas Wels, 1. Wandeloorddwstr. 33, Roterdamo. En Norvegio oni turnu sin al K-do E. Flenning, Folketeatret Oppg. C. 4de etasje, Vaerelse 418, Oslo. El Gotenburgo: Per Olausson, Alvsborgsg. 15 E, Gotenburgo. El Polio: K-do A. Piotrovski, Czarnowiejska 30, Krakovo.

MONSANGO : Ĉar ni sukcesis aranĝi bankoficejon en la kongresejo, ni forte admonas vin: ne ŝanĝu vian monon an-

taŭ ol vi venos al Kopenhago! Ankaŭ por la ekskurso al Svedio tiu arango montrigigos tre utila.

FERVOJA RABATO : Ne atendu de ni la ŝajne kutimajn rabatilojn. La afero ordiĝas jene: 1) Vi aĉetu tute ordinaran unu-vojan bileton al Kopenhago. Veninte al Kopenhago vi ricevos atestaĵon tiel ke vi povos reveturi al la dana limo por la duona prezo de la alveturo. Aŭ 2) Vi aĉetu tute ordinaran ambaŭvojan bileton al Kopenhago. Veninte ĉi tien vi ricevos 25 % de la biletprezo. — Tiuj arangoj validas ankaŭ, se via bileto estas kupono en kuponkajero. Pri rabatoj ĉe alilandaj fervojoj ni ne povas informi. Bonv. enketi en lokaj vojaĝoficejoj.

LEGEJO estos aranĝata en la kongresejo. Ni tiom multe aranĝis por vi, ke nun ni kuraĝas peti vin fari al ni servon! Sendu al tiu legejo (per OKK) multajn freŝaperintajn esp. gazetojn k periodaĵojn. Multaj ĝojos pro tio!

POŝT- K TELEGRAFOFICEJO estos aranĝata dum la kongreso en la kongresejo per la komplezo de la dana ĝeneral-direkcio por poŝto k telegrafo. La poŝto-vicejo uzos oficialan poŝtstampon kun la teksto : « La XIX-a Kongreso de SAT, Kopenhago 1939 », krom dato.

POSTAĴOJ AL LA KONGRESANOJ dumkongrese povos esti sendataj sub jena adreso: La 19-a SAT-kongreso, LA ODD-FELLOW PALAGO, Kopenhago.

VOJAĜOFICEJO : La granda vojaĝoficejo « Oversoisk Passagerbureau » kiu antaŭ kelkaj monatoj fondis Esperantofakon, konsentis aranĝi dum la kongreso vojaĝoficejon en la kongresejo. En tiu oficejo la kongresanoj povos ricevi ĉiajn informojn pri vojaĝ-aferoj, aĉeti biletojn (ekz. por la revojaĝo hejmen), ktp. Ni petas, ke oni kiom eble plej multe uzu tiun servon.

SUBVENCIOJ : De la sindikata movado ni ricevis kelkajn donacojn: La Ligo de sindikatoj en Danio: 500 d. kr., La tipografista sindikato: 100 d.kr., La bierlaborista sindikato: 50 d. kr., La laborista sindikato: 100 d. kr., La fervojista sindikato: 100 d. kr.

KIEL ATINGI LA KONGRESEJON : De la ĉefstacidomo uzu tramliniojn 1 k 6 aŭ aŭtobuslinion 11 (direkto Osterport). Svedoj, kiuj venos per la Oresund-boatoj povas dum 5 minutoj promeni al la kongresejo, Odd-Fellow Palaet, Bredgade 28.

KONSILO : Kunprenu tiun ĉi komunikon. Ne tro kalkulu pri via memor-kapablo!

SALUTOJ : Ĉiam efikas solene k feste alsendo de multaj salutoj al niaj kongresoj. Do vi, K-do aŭ K-dino, kiu ial ne povos ĝui viziton en Kopenhago, sendu al la kongreso saluton! Ni petas vin skribi nur unufanke, ĉar la salutoj k telegramoj estos fiksataj sur tabulego.

LA AKCEPTEJO malfermiĝos sabate la 5-an de aŭg. je la 10-a horo en Odd-Fellow Palaet, Bredg. 28. Klopodu veni frue dum la tago, nepre venu ĝustatempe al la Solena Malfermo (19.30), ĉar grava parto de la programo estos radio-disaŭdigata.

PROGRAMO DE LA KONGRESO:

Vendrede la 4-an de aŭg.: 20.00. Kamaradeca vespero aranĝata de la Laborista Klubo, Kopenhago, por frualvenintoj. Kunveno (bv. atentill) Grundtvigs Hus, Studiestraede 38 (tute proksime al la urbodoma placo).

ĉ. 23.00. Akcepto de la angla karavano.

Sabate la 5-an: 9.00. La akceptejo malfermiĝos.

19.30 (bv. atenti la tempon, nepre ne venu tro malfrue!) Solena Malfermo de la kongreso (la granda salono de la kongresejo).

Dimanĉe la 6-an: 10.00. Malfermo de Labor. Universitato du lekcion (Neergaard, Norman).

14.00. Publika propaganda kunveno en «Faelledparken» (popola parko).

16.00. Koncerto de la kopenhaga komunumo.

20.00 Interkonatiĝa vespero (kunveno: Grundtvigs Hus).

Lunde la 7-an: 9.00-11.00. Unua Laborkunsido.

13.00-15.45. Frakciaj kunsidoj.

16.30. Oficiala akcepto en la urba domo.

19.45. Laborista Universitato: lekcion de Otto Simon.

20.30. Dua laborkunsido.

Marde la 8-an: 9.00-11.30. Tria Laborkunsido.

13.00-15.00. Fakaj kunvenoj, poste Vizitoj al diversaj kooperativaj institucioj.

20.00. Laborista Universitato: lekcion de Kiaer k Leünbach.

Merkrede la 9-an: 9.00-12.00. Laborista Universitato: Libera diskutado pri « la lab. movado en la aktuala politika situacio ». (t.n. « interfrakcia kunveno »). Detaloj i.a. pri regularo por tiu kunveno aperos en la kongresa libro.

14.00. Kvara laborkunsido. Eventuale, se ĝi ne necesas, tiukaze: daŭrigo de la diskutado, se tio estas dezirata. Cetere estos okazo por suplementaj fak- k frakcikunvenoj.

16.00. Frakcikunveno de Sennaciistoj.

20.00. Sennacieca esperanta kabaredo kun balo k surprizoj.

Ĵaŭde la 10-an: 10.00. Ekskurso per luita ŝipo al Malmö (Svedio). Prezo: tienreen: 2,50 d. kr.

11.30. Alveno al Malmö. Rondiro per aŭtobusoj al koloniĝardenoj k kooperativaj loĝejoj. Kolektiĝo en Popola Parko, propaganda kunveno, komuna manĝado. Laborista Universitato: Ferma lekcion de J. Simon. Fermo de l'Kongreso.

22.00. Reveturo al Kopenhago.

Vendrede la 11-an: Ekskurso peraŭtobusa al Nordzelando. Vizitoj al Internacia Altlernejo, modelbieno, kooperativa laktejo.

8-a LISTO DE ALIĜINTOJ

366. Joh. Noordam, Hago; 367. L. Yzorsky, Leeds, Anglio; 368. Nellie Cohen, Leeds; 369. Hilda Marks, Leeds; 370. Bessie, Leeds; 371. Th. Aldworth, Bedwas, Anglio; 372. St. Will. Brown, Londono; 373. H. Stoute, Leiden, Nederl.; 374. S. Serdijn, Leiden; 375. S. Morpurgo, Hilversum; 376. Gr. Beets, Amsterdam; 377. W. Peake, York, Anglio; 378. René Courtois, Vanves (Francio); 379. E. C. Kater, Rotterdam; 380. W. Bohlander, Amsterdam; 381. A. Eliassen, Göteborg, Svedio; 382. Cl. Raun, Aarhus, Danio; 383. K. Budtz Jørgensen, Kopenhago; 384. Al. Swart, Beets, Nederl.; 385. M.-J. v.d. Berg, Hago, Nederl.; 386. Selma Lierens, Amsterdam; 387. Len Shipp, Southport, Anglio; 388. Rose Waters, Southport; 389. Alise Waters, Southport; 390. A. Delaye, Arcueil, Francio; 391. P. Maisonneuve, Privas, Francio; 392. A. van Wijk, Amsterdam; 393. H. v. Waert, Laren, Nederl.; 394. J. Groenhart, Bloemendaal, Nederl.; 395. P. Olausson, Göteborg; 396. J. Andreasen, Kopenhago; 397. E. Pedetsen, Jyderup, Danio; 398. M. v. Scheepen, Hago; 399. R. v. Putten, Amsterdam; 400. Kl. van Putten, Amsterdam; 401. S. Guillou. Kergrist-Moëlou, Francio; 402. K-dino Guillou; 403. J. Frielink, Alkmaar, Nederl.; 404. I. Turner, Prestwich, Anglio; 405. Al. Hansen, Højbjerg, Danio; 406. A. Fr. Jensen, Boeslum-Ebeltoft, Danio; 407. E.

Larsen, Kopenhago; 408. Alb. Thiou, Tours, Francio; 409. R. H. Knip, Utrecht; 410. A. Gyllsdorff, Linköping, Svedio; 411. D. Eriksson, Stokholmo; 412-413. Ge-kdoj. Duyvenbode, Amsterdamo; 414. W. Westphal, Hago; 415. Et. Carron, Dunkerque, Francio; 416-417. Ivar & Linnea Aström, Umea, Svedio; 418. Ejnar Johansen, Randers, Danio; 419. A. Oustlandt, Rosendael, Francio; 420. A. F. Larsson, Göteborg; 421. L.J. Rolandus, Roterd.; 422. J. de Ridder, Sidam (Ned.); 423. J. Boutkam; 424. J.W. Tierolf; 425-6. Gek. v.d. Koore; 427-8. Gek. v. Noord; 429. K-ino Duvekot; 430-31; Gek. de Nobel; 432. M. J. Wengel (ĉiuj el Roterdamo); 433. K-ino A.v.d. Starre, Ijmuiden (Ned.); 434. K-ino A. Bois, La Fresnais, Francio; 435. J. Boom, Beverwijk (Ned.).

PRIPOLITIKA KUNVENO DUM LA SAT-KONGRESO

Vi kelkfoje povis legi en « S-ulo » pri plano aranĝi komunan pripolitikan kunvenon. Kelkaj gek-doj jam esprimis sian simpatian kun la plano, kelkaj ankaŭ faris la kontraŭon. La praktika aranĝo tamen ne tre prosperis. Pro tio ni skribis al O.K.K., petante kunvenejon. La aranĝon de la kunveno mem ni faru en Kopenhago. Tie ĉiuj partoprenantoj povos kunveni dum libera horo, por decidi pri la organizado. Ĉar tio ne povas esti reguligata de ni, kiuj estas nek sen-, nek supertendencaj, sed devos esti aranĝata de ĉiuj kunvenantoj.

Pri la temo pritraktota neniŭ propono nin atingis. Ni do faras proponon jenan: ni diskutu pri la SOCIAJ KAŬZOJ DE LA DISVASTIGO DE L' FASISMO, serĉante la konsekvencojn rilate la KLASAN BATALON DE LA LABORISTARO. Kvankam ŝajnas al ni ke tiu ĉi temo estas sufiĉe aktuala k ĝeneralinteresa, la kunvenantoj en Kopenhago kompreneble rajtos decidi aliel, se ili tion deziras. Intertempe ni invitas ĉiujn interesiĝantojn pristudi la temon, por ke la diskutoj estu kiel eble plej fruktedonaj. Verŝajne ni antaŭ la kongreso ankoraŭ sendos alvokon al ĉiuj kongrespartoprenantoj, por instigi ilin al aktiva partopreno.

Marcelo Leereveld, Amstelveenseweg 753 supra, Buitenveldert — Amsterdamo (Suda). (Sekr. de SOVKOMFRAK).

Ĉe la Laboristaj Esp. Asocioj Komuniko de F.E.T. (franclingva L.E.A.)

Komence de la nuna jaro « Fédération Espérantiste du Travail » (LEA-o en Franclingvaj regionoj) luis apartan sidejon en Parizo, kie estas instalitaj ĉiuj administraj servoj kun deĵoranta oficisto, por certigi regulan funkciadon de tiuj servoj. La financa k morala raportoj por la lasta jaro montras, ke la Federacio konsistas nun el 85 grupoj, 1576 anoj, 520 simpatiantoj, 350 gazet-abonintoj. La kongreson en Nîmes ĉeestis proks. 50 K-doj el 13 grupoj. 52 grupoj estis reprezentitaj (kontraŭ lastjare 32). La agad-raporto estas akceptita per 539 voĉoj (de 34 grupoj) kontraŭ 108 (3 grupoj) k 61 sindetenoj (4 gr.). La novaj grupoj (nevoĉdonrajtaj) deklaris sian aprobon. La 8 membroj de l'antaŭa komitato estas unuanime reelektitaj, kun aldono de du pliaj membroj.

La Kongreso unuanime akceptis rezolucion, kiu konfirmas fidelon de la asocio al la unueckontrakto akceptita en jaro 1936. La Federacio akceptis proponon de Nederlanda LEA pri organizo, venontjare, de internacia infanrenkontiĝo en Francio.

Informojn liveras: F.E.T., 16bis, rue Bardinnet, Paris, 14-e (p.s.k°: Paris, 902-52) — en Belgio: K-do Somville, 290 rue A. Castiaux, Quaregnon.

La 10-a Kongreso de Svisaj Lab. Esperantistoj

okazis la 7-an de majo en Zuriko. Partoprenis 13 Gekamaradoj sub prezido de K-do Renaud el Berno. La grupoj raportis pri regulaj kunvenoj, sed kun malmultaj ĉeestantoj. K-dino Rätz, Berno, estis elektata kiel redaktorino de « La Semanto » (post foriro el Svisio de la ĝisnuna redaktoro). K-do Kobelt organizas Esperanto-Semajnon sur Herzberg (apud Asp, en la ĉirkaŭo de Aaraŭ, kie kuŝas la hejmo de l'Svisa popolaltlernejo). La Esp. semajno okazos de 5.-12. aŭgusto.

Letero de "Internaciuloj"

Antaŭ kelha tempo venis al ni, el diversaj fontoj, la famo, ke helpas al skisma entreprenon iuj K-doj en koncentrejo, kiuj tamen ricevas helpon el la fondaĵo kreita de SAT-anoj. Al K-do Fr. Haiderer, eks-Internacibrigadano nun en koncentrejo en GURS, ni demandis, ĉu vera aŭ ne estas tiu famo; ni konsideris kiel nian devon enketi pri la afero, ĉar ja ni sentas nin respondecaj antaŭ la SAT-anoj, kiuj donacis brikon por la fondaĵo. La SAT-anoj estas la malplej particecaj, malplej sektemaj, la plej toleremaj, — krome ili tute ne postulas dankon de la K-doj, kiuj dividas inter si la kolektitan monon. Tamen tiuj SAT-anoj ne povas konsenti, ke la helpatoj malrekomendu nian asocion.

Ni do demandis al K-do Haiderer, ĝisnuna peranto ĉe la « Internaciuloj » en Gurs, k responde jen la letero, kiun ni ricevis k kiu pruvas klare la pravon de nia demando! Pro motivo facile divenbla ni ne citas la 45 subskribojn, — escepte de du, kiuj mem ne timis publikigon de sia nomo en la gazeto de IPE-anoj.

« ... Nia kolektiva opinio estas jena: Ni trege dankas al la SAT-anaro por la materiala helpo, kiun ĝi oferis al ni esp-istoj de Internaciaj Brigadoj, k samtempe ni ankaŭ dankas al la SAT-estraro por la organizo de ĉi tiu helpo. Ne estas novaĵo, ke en la vicjoj de la I.B. troviĝas homoj el la plej diversaj antifaŝistaj rondoj de la mondo, k vi indikis en via letero, ke vi ne atentis la politikan tendencon aŭ organizan apartenecon, k en ĉi tiu senco ni uzis la monhelpon nur por Esperanto (aĉetado de kajeroj, kraĵonoj, papero, kreto por la kursoj ktp.) Ni rezignis la aĉetadon de nutraĵo, kiun ni ege bezonas ĉi tie k preferis la E-aferon. — Ne temas pri primokado al la SAT-anaro aŭ malfavora parolado, sed ni ĉiam kritikis k-as la skribmanieron de la SAT-organoj... Unue ni sentis nin trege ofenditaj pri la artikolo « Evoluaj Fazoj en Hispanio » (Senn. Revuo n° 1: (59), 10. jan. 1938, p. 152)...

(Sekvas cito de la sub-ĉapitro « Kion donis la rusoj al Hispanio? » kun rebato ke la internaci-brigadanoj meritas alian pritakson, ol kiun faras la verkinto de tiu artikolo, pri kio estas pruvo la kortuŝa adiaŭo de la hisp. popolo, kiam estis retiritaj la eksterlandaj volontuloj de la frontoj. — Dua cito konsiderata de la subskribintoj kiel kalumnio, estas el maja « S. R. » 1939, p. 37: «... Nek Franko nek Negrin reprezentas la socian juston... »).

« Ni estas pretaj kunlabori kun ĉiuj veraj antifaŝistoj, kiuj volas la unuecan fronton kontraŭ la faŝismo. Unuece ni batalis ŝultre ĉe ŝultre en la tranĉeoj de la libereco kontraŭ la faŝisma invado kune kun respublikanoj, socialistoj, komunistoj, anarkistoj k ĉiuj antifaŝistoj. Ni akcelas

atingi la unuecan lab. esp-istan movadon de ĉiuj antifaŝistoj esperantistaj, kiu baziĝu sur Popola Fronto. Se ni ne baldaŭ efektivas la unuecon inter la laboristoj, ni lernos tion verŝajne poste en la faŝistaj koncentrejoj.

« Ni scias, ke tiaj artikoloj aperas kun la konsento de la SAT-estraro k ni, kiuj dum du jaroj k pli batalis en Hispanio kun la armiloj en la manoj kontraŭ nia komuna malamiko, la faŝismo, neniam povas konsenti tian skribmanieron, per kiu oni neniam povas atingi la unuecan fronton. « S. R. » k « S-ulo » estas plenaj de tiaspecaj kalumnioj k tial ni ne povas plenumi nian aliĝon al SAT. Tiu letero esprimas la pensmanieron de la subskribintaj koncentritaj esp-istoj en Gurs. Kun antifaŝista saluto :

Fr. Haiderer, E. Pfeiffer k 43 subskriboj. »

Ni respondas al tio jene :

Ambaŭ riproĉitaj artikoloj estas tradukoj faritaj de SAT-anoj (la dua de barcelona milicano en koncentrejo). La 45 riproĉantoj, spertinte malplezuron ĉe legado de linioj esprimantaj opinion kontraŭan al ilia, super tio tute malatentis, ke la anaro de SAT ne konsistas ekskluzive el « popolfrentanoj », sed ankaŭ el anoj de tendencoj, kiuj ne konsentas pri la programo de la diverslandaj « popolfrentoj ». SAT estas malferma al anoj de ĉiuj tendencoj, kiuj agnoskas la klasan dividon en la socio. Sekve ĝiaj gazetoj reprezentas sintezon de malsamaj opinioj, laŭ tutmonda skalo. Ne estas la tasko de la estraro de senpartieca organizo, kia SAT, juĝi pri tiu aŭ al aserto aŭ cito en la diverstendencaj artikoloj prezentataj en la gazetoj. Ankaŭ ni ni estas praktike neeble kontroli la verfaktecon de ĉio, kio estas prezentata de kunlaborantoj. Ni ĉiam admonas al konservado de la supertendencaj karaktero de nia organizo k al konforma skribmaniero en la organoj.

La « Internaciuloj » de Gurs rezonadas, kvazaŭ ekzistas unuanima opinio, ĉe la revolucia laboristaro, pri la hispana afero. Ege vasta k kompleksa estas la problemo.

Estas evidente, ke la koncentrejoj tro proksimas al la objekto de la temo ; ili povas vidi nur parteton el ĝi. Ilia horizonto estas tuj antaŭ ilia okulo ; perspektivon ĝeneralan ili ne povas havi ; same soldato kapablas observi nur tion, kio okazas en la mallarĝa sektoro, kie li cirkulas, sed malscias pri la kaŭzoj de la milito, pri la strategio de la ĉefoj, pri la enkulisa agado de anonimuloj, kiuj servas la intereson de granduloj aŭ ŝtatoj. — Jes, tiu manko de kontakto kun la libera ekstero klarigas la nur partan informiĝon de niaj K-doj, k ĝuste ili devus danki al niaj gazetoj, kiuj liveras al ili materialon por mediti k dedukti.

Sed ni nenion faros, kio kontraŭus la principon de intertendencaj toleremo ; ni ne

AVIZO!

Pro vojaĝo de la redaktoro-oficisto, la Oficejo de S.A.T., 67, Avenue Gambetta, Paris-20, estos fermita de la 1-a ĝis 21-a de aŭgusto. Tamen libromendoj k urĝaj korespondadoj ankaŭ dum tiu tempo estos plenumitaj. La venonta numero aperos regule la 25-a de aŭgusto. Anoncojn k manuskriptojn por tiu n-ro oni sendu nepre ĝis la fino de julio!

demandas pri la tendenco aŭ partianeco de niaj kunlaborantoj. Ni juĝas la manuskriptojn nur laŭ ilia valoro informa, dokumentiga aŭ morala, laŭ la grado de intereso, kiun ili povos vekti ĉe la legantaro. Ni neniam konsentis nek konsentos partian sintrudon en SAT, tiom longe kiam SAT laŭ sia statuto estas superpartieca organizo. Kaj tial ni respondas kun serena animo al la K-doj el la brigadoj, kiuj pro partieco ne povas plenumi sian aliĝon al SAT : « Ni tute ne estas trudemuloj. Neniu havas la moralan devon aliĝi al nia asocio, se la laborista unueco esperantista, tia kia ĝi esprimiĝas praktike k efike en SAT, estas kontraŭa al liaj konceptoj. »

Tamen ni vokas senlace, ree k ree al ĉiuj prolet-esperantistoj, kiuj sincere volas la laborist-esperantistan unuecon : Via loko estas en SAT, kiu funkcias de 18 jaroj en la servo de la Laborista esperantismo dank' al la konscia k reciproke tolerema kunagado de Gekamaradoj el plej diversaj tendencoj.

Plenum-Komitato de SAT.

El la Notlibro de Alfesto

En la *Vulgara Esperantisto* (n-o de marto 1939) troviĝas jena perlo : « La bazo de Esperanto estas la (substreko mia) naciaj lingvoj. Se ili ne ekzistus, ne povus naskiĝi Esperanto kiel *internacia* (sed ne « sennacieca »!) lingvo. »

La bazo de nia lingvo ne estas la naciaj lingvoj, sed nur kelkaj, tre malmultaj el la 1500 ekzistantaj. La argumentmaniero de la redaktoro de la menciita gazeto estas vere el tre vulgara tipo sofisma. Kaj por montri al li, ke ankaŭ sennaciisto povus sofisme argumenti, mi diru : « la bazo de l'nacioj estas la tero ; se ĝi ne ekzistus, ankaŭ ne povus ekzisti la nacioj. Sekve, la planedismo (sennaciismo) estas multe pli fundamentita ol la internaciismo. »

Tia argumentmaniero senvaloras. La sennaciismo estas simple la konstato, ke ekzisto de nacioj havas kiel faktan rezulton, ke ĉiam milito ekzistas inter ili, ĉu efektive, ĉu latente. En nia epoko la nacioj estas vera pesto por la homaro. La racio postulas ilian malaperon k la starigon de mondregno.

Tial ke esp-o apartenas al neniu aparta popolo, al neniu nacio k estas destinita al la tuta mondo, ĝia ĉefa kvalito estas do la tutmondeco aŭ sennacieco. Kaj pro tio, ke per sistema aplikado de nia lingvo la homoj havas la eblon senigi sin je ĉia nacieco, ties profunda signifo, ties « interna ideo » estas do la sennaciismo.

Hitler estas tute prava, opiniante, ke la praktikado de tia lingvo povas nur difekti la naciecan senton ĉe ties uzantoj. Kaj nemalpli signifa estas la fakto, ke de kiam Stalin komencis akcenti sian naciisman politikon, de tiam la esp-a movado en Sovetio statas tute same kiel en Germanio. Por pravigi mian aserton sufiĉu menci, ke I.P.E. devas likvidiĝi, kvankam ĝi ne estis, kiel S.A.T., malpermesita en Stalinio.

Por ke la legantoj ekvidu tute klare la sofisman argumentadon de la « Vulgara

Esperantisto », mi krome faros jenan aserton : la franca, hispana, itala, portugala, rumana lingvoj ne estas naciecaj, ĉar iliaj radikoj plejparte originas el la mortinta latino, kiu ĝis la deksesa jarcento estis la komuna lingvo de ĉiuj kleruloj el Eŭropo. * *

En iu franca gazeto, kies programo estas precipe pritrakti seksajn temojn, k kies redaktoro estas multe pli lerta sofistoj ol tiu de « V. E. », mi legis jenon : « *Nova lingvo internacia*... ĝi estas la natura evoluitaĵo de la internaciaj idiomoj jam ekzistantaj (substreko mia) : volapuk, esperanto, ido ktp. »

La redaktoro tamen bone scias, ke fakte nur esperanto ekzistas, ke ĉiuj aliaj estas mortintaj aŭ tre verŝajne -ontaj projektoj.

La fakto estus neniel menciinda, se SAT-anoj ne monhelpus al tia gazeto. Plej vipinda estas la intelekta malhonesto.

En nia movado

(KRONIKO)

Francio. Montarĝio. La loka SAT-rondo aranĝis je la 2-a de julio sukcesan feston, kiun ĉeestis interalie 12 SAT-rondanoj el Parizo. Matene okazis sub gvido de K-do Poupa ekzamenoj pri elementa lernado por sep Gek-doj. Post komuna manĝo, kiun partoprenis 26 Gek-doj, sekvis en urba salono fest-programo kun kantoj k teatraĵo, kiujn bone prezentis la montarĝiaj gegrupoj, k kun alparolo esp-lingva de K-do Bartelmes, sekretario de SAT, kun traduko franclingva de K-dino Glodo, red. de « SAT-Amikaro ».

Nancy. La limrenkontiĝo organizita ĉi tie la 2-an de julio bone sukcesis. Dum epoko, kiun regas naciismo, k en regiono, kie la lab. esperantistaro estas malforta, kvardeko da esp. laboristoj renkontiĝis. Tri nederlandaj k dana K-doj ankaŭ ĉeestis. La SAT-Kongreskomitato letere salutis. Sento de solidaro k trateco regis ĉi tie dum du tagoj. Pro ĵus okazinta morto de K-do Lair (muzikkomponisto, membro de la lab. esp. grupo) ne okazis la por sabato projektita vesperfestoj. En la laborkunsido parolis K-doj el Nancigo, Raon l'Etape k Roterdamo. Vizito al artmuzeo k al vilaĝo Maron en la Mozelvalo, kie okazis komuna tagmanĝo. Promeno al naturamika rifuĝejo en Hej-arbaro. Oni renkontiĝos denove dum sept. en Raon l'Etape (Vogezoj).

Nederlando. — La 23-an de junio la **Haga SAT-rondo** kunvenis en Seveningen, en la klubejo de l'3-a FLE-sekcio, kie antaŭ pli ol 100 Gek-doj el Hago, Seveningen k eĉ el Delft K-dino Habert el Maroko, survoje al Kopenhago, paroladis, post kiam muzikis tri artistoj, kiuj bonvole k senpage kunlaboris, k post kanado de la seveninga infanĥoro esperantista k deklamo de Manjo Varkevisser. K-dino Habert per sia facila, humorplena maniero rakontis al ni multon interesan pri Maroko k aliaj landoj, kiujn ŝi vizitis. Per forta aplaŭdo dankis ŝin la tre kontenta aŭskultintaro, al kiu ŝi ankaŭ

JUS APERIS!

Andreas Latzko :

Homoj en Milito

Traduko el la germana originalo de Karl MINOR. 190 paĝoj. Form. 14 x 21. Prezo: broŝurite: 30.— ffr. bindite: 38.— ffr.

SAT, 67, aven. Gambetta, Paris 20.

(Por Nederlando k Svedio la respektivaj libroservoj).

esprimis la salutojn de l'portugalaj Gek-doj. (Ni dankas ilin k reciprokas per ĉi tiu vojo, dezirante ke ili trovu la forton elteni la penojn, kiujn ili devas suferi por nia komuna idealo.) La korespond-adreso de l'Haga SAT-rondo estas : Maystr. 104, Hago.

Gaja grupo biciklis la 11-an de junio de Amersforto al Mooi Veluwe, la nova restadejo kun kampdomo k tendarejo mezvoje inter la vilaĝoj Putten k Garderen. Granda verda flago indikis la lokon. Gek. Sprenger jam atendis nin. Postmanĝe en renkontejo bele garnita per memfaritaj meblaro k pentroj, ni promenis tra la ĝardenoj (kie staras multaj tendoj) k vizitis la ĉambrojn (freŝaeraj dormejoj kun loko por 60 personoj; aparta ligna domo kun familiĉambroj). Nia societo konsistis el diverslingvanoj (la plimulto, kompreneble, nederlandanoj). La konversacioj estis interesaj k lernigaj. La tarifo por manĝoj k loĝado estas malalta, k grupoj ricevas apartan rabaton. Ni do rekomendas al ĉiuj la novan esp. centron. Por aranĝi komunajn ekskursojn tien, rilatu rekte kun K-do Sprenger, « Mooi Veluwe », Garderensche weg E. 40 apud Groot Spriel, Putten (Veluwe), ĝiro 347207. Jen ideala loko por via ferio. (P. Poort-Procée).

Tra la Esperanta Gazetaro

ĈU KONSCIA AŬ NEKONSCIA NACIEMO ?

« Heroldo » raportas en n-o 22 (1027) pri la 36-a kongreso de la franca propaganda societo esp-ista (sekcio de I.E.L.). Ni legas, ke nur 80 esp-istoj ĉeestis por kongresi en la ĉefurbo de Ĉampanio, el kiuj nur 19 honoris per sia ĉeesto la posttagmezan laborkunsidon. Plue : « S-ro Stuit bedaŭras, ke la diskuto ne okazas en esperanto. » Kial do esperantistoj, kunvenantaj en kongreso, ne uzas la okazon por praktiki nian lingvon? Ĉu pro oportunismo (ĉar estas pli facile babili nacilingve), ĉu por kaŝi ion al la ĉeestantaj eksterlandaj esp-istoj (estis 3, ne enkalkulante s-ron Grenkamp)? Aŭ ĉu, ĉar temas pri nacia (tutlanda) kongreso, ne indas paroli internacian lingvon?! Diskutante nacilingve en laborkunsido (ne en propaganda manifestacio por ekstera publiko!) oni facile vekas la impreson, kvazaŭ oni ne kapablas paroli esperanton. Kaj tio certe estas nek propagand-etika, nek ĝentila rilate alilandajn gastojn.

SIN ADAPTI AL LA CIRKONSTANCOJ...

Esperantisto Julio Bagi (Baghy) en « Hungara Heroldo » (n-o 2) alvokas por aranĝo de « Konferenco de Mezeŭropaj Esperantistoj ». Certe J. B. estas el tiuj, kiuj volas transvivigi la esp-an movadon ĉiu-cirkonstace k ĉiurimede; pro tio li estas devigata proponi « edziĝon inter fiŝo k kato ». Li venas proksimume al la samaj konkludoj, kiel en niaj vicoj K-do Kaŝo. Li difinas la memstaran animon de la unuopaj nacioj, la nacian socion, poste malkovras la komunajn interesojn de pluraj popoloj, « kiujn la jarmila kunvivado spirite k rase parenĉigis donante al ili — malgraŭ la lingva diverseco — animan unuecon. » Li konkludas al kultur-unueco de tuta Eŭropo (de la tuta blanka raso eŭropa, li precizigas); li parolas pri eŭropa prestiĝo; k estas videble ke Mez-eŭropo li konsideras kiel kernon de la eŭropa forto; la okcidento, la nordo, la sudo k oriento nur aglomeriĝas kvazaŭ akcesore al tiu kerno. La tezo ne estas nova; ni aŭdis ĝin jam el la buŝo de hegemoni-politikistoj... tamen, ni rekonu, la deziro de Bagi estas, antaŭ ĉio savi la esperantismon tie, kie ĝi komencis perdi sian ekzistojn. Kaj tio nepre estas laŭdinda.

KIU PRAVAS ?

En « La Praktiko » (n-o 6) oni legas fruntpaĝe pri la usona filmo « Idiota Amuzo » : « ... La uzo de esperanto en ĉi tiu filmo estas gravega okazaĵo en la historio de nia movado. » Dume, en « Franca Esperantisto » (n-o 57) E.Ĝ.A., kiu rigardis la filmon en Parizo, skribas : « Laŭ propaganda vidpunkto tiu filmo neniel utilas. Nek la publiko nek la gazetaro povas suspekti, ke esp-o, kies nomo ne estas eĉ unufoje elparolata, ludas ian rolon en tiu ĉi prezentado. » Kaj : « ... estas strange, ke la aŭtoro, dezirante uzi lingvon komprenatan de neniu, elektis precize lingvon, kiu celas esti komprenata de ĉiuj. »

Kiu el ambaŭ pravas ?

LA PLEJ BONA LIBRO

Sub tiu ĉi titolo « La Praktiko » aperigas en n-o 6 eksterordinare laŭdan artikolon de esperantisto el Rejkjavik (Islando) pri la « Plena Vortaro de SAT ». Ekzemple li skribas : « Por ĉiulandaj progremuloj tiu libro estas la sola nepre bezonata vortaro. Ne havante nacian-esperantan vortaron, en multaj kazoj oni facile povas uzi tiun libron anstataŭ ĝi... » Kaj la skribanto aparte substrekas la universalon de la « P. V. », ĝian multfaktecon, ĝiajn precizajn klarigojn. Fine li ekkrias : « Verkisto ! Se al vi mankas temo por novelo, rigardu en la Plenan Vortaron, k tuj vi ricevas la inspiron. »

Ĉu ekzistas ankoraŭ seriozaj esperantistoj, kiuj ne posedas tiun ĉi verkon ?

Esperanto revivetas en Portugalio

Post la venko de Franko en Hispanio k aresto de la plej konataj proletoj, kiuj nun vivaĉas en la karceroj de la lando k en Kabo Verde, kie pro la malbona klimato, manko de higieno k medikamentoj, multaj malsaniĝas k mortas; la politika situacio en Portugalio iom pliboniĝis, rilate al persekutoj, teroro ktp. La cenzuro ne estas tiel rigora. Oni jam permesas la propagandon de esperanto, kiu estas farita de du provincaj gazetoj. Unu el ili (Socia Vivo) publikigas unu paĝon de sciigoj pri k por esp-o. Tiu paĝo iam estis redaktita de Laborista societo, sed nun du neŭtraluloj prizorgas tiun redakton. Ili faras propagandon naciistan (alia ja ne povas esti); tamen, tiu propagando iom vekis la esp-istojn k incitis ilin al laboro k diskonigo de nia lingvo, kion ili ne faris ĝis nun pro timo. En tiu paĝo de Socia Vivo oni mencias, kiel estas uzata esp-o en Italio k ĝia grava utilo por radio-elsendoj, nacia propagando ktp. En unu n-ro de majo de tiu gazeto aperis la portugala nacia himno tradukita en esp-on. Propagando por SAT ankoraŭ ne estas ebla. (X).

Jam multaj personoj antaŭmendis la aperontan libron : Leteroj de E. Lanti, k eble ili nun emas pensi, ke la anoncita verko estas mita projekto. Tiu penso estus erara. La prokrastiĝo rezultas de tio, ke ni volis, ke la aŭtoro legu almenaŭ la unuajn presprovojn. Sed la leganto prezentu al si, ke li tiam estis ĉe la antipodo k ke ses semajnoj necesas, por ke poŝtaĵo el Parizo antingu Nov-Zelandon. Sama tempo en revena direkto... Ni diris sufiĉe, por ke la legantoj komprenu la kaŭzon de l'prokrastiĝo. Nun la afero statas tiel : se la presisto plenumas sian promeson, la libro aperos en oktobro. Samokaze ni sciigu, ke la verko estos 280-paĝa, ilustrita k kun antaŭparolo de profesoro G. Varingjen (Waringhien), kunaŭtoro de « Plena Vortaro » k ano de la Esp. Akademio.

Forgesita k Pardonita

Brelsford (Brailsford) finverkis sian libron « La Milito de Ŝtalo k Oro » duonan jaron antaŭ la eksplodo de l'mondmilito. En novembro 1914 ĝi aperis nederlanden tradukita. En tiu verko Brelsford montras, kian treege gravan rolon ludas la financistoj k la grand-industriistoj, por plifortigi la armadojn, k kiel la politiko de l'grandaj ŝtatoj koncerne tion estas « ne-malimplikeble » miksitaj kun financaj aferoj. Evidentiĝis, ke « ŝtalo k oro » ĉiam iris kune, en tiu senco ke la popoloj pagis la ŝtalon por la armado k ke la armilfabrikistoj (ĉi tiuj laŭ plej vasta senco) enpoŝigis la oron. Tamen la sekvo — nome milito — ne forrestis.

Povas esti, ke multaj venis sub la impreson de la dokumentita argumentado de Brelsford, sed jam okazis la milito tutmonda. Post kiam la milito por ĉiam estos forigita, estos sufiĉe frue por sin okupi pri la bedaŭrinda politiko de antaŭ 1914. Kvankam tio havus tiam nur historian valoron.

Kiam post la mond-milito la mond-paco ne tuj alflugis per blankaj flugiloj, kiam evidentiĝis, ke, ju pli oni malproksimiĝis de l'jaro 1918, des pli ĝi fornebuliĝis, — tiam ili kuraĝis eliri el la mallumo. « Ili » — tiuj kiuj havas intereson pri milito, kiuj volas gajni oron per ŝtalo, per hejt-oleo, per ĉio, kion oni bezonas por granda popolbuĉado. La Ligo de Nacioj, ilia natura malamiko, estis atakata. La tie entreprenitaj paclaboroj estis subfosataj de lertaj, senkonsciencaj, riĉe pagataj propagandistoj de la interesatoj. La nomo Zaĥarof (1) estas al ni ankoraŭ konata. Okaze de lia « famiĝo » certe la publika indigno estis forta. Oni ja deziris pacon. Kaj estas eble, ke tiutempe kelkaj denove tralegis la verkon de Brelsford k demandis al si, ĉu ĉiuj ĉi gravaj registaranoj, kiuj ofte kunvenis en Genevo, ne havas rilatojn kun armadistoj.

Sed — oni restis indignitaj. Kiu ja volas gajni mono per milito! Tiu indigno ankoraŭ plifortiĝis, kiam esploro en Usono — esploro ordonita de l'senato, malkovris, ke la milita industrio fiagas. Tutaj kompanioj estas procesataj, kelkajn semajnojn daŭras la demandado; la raporto ampleksas kelkajn milojn da paĝoj. Ilia komerckorespondajaro publikigas. Montriĝis, ke la sinjoroj laboras por ĉiuj registaroj. Iliaj nuraj malamikoj estas la nemultaj pacamikoj inter la multaj delegitoj al Ligo de Nacioj en Genevo. Sed por tio ili havas siajn « oficistojn », siajn « laborantojn », kiuj faras sian kaŝan laboron — por multe da mono.

Ĉiuj gazetoj represis partojn el tiu raporto, k kvankam estis malaperinta la kredo, ke la mond-milito alportos la pacon, kvankam jam ekkreskis dubo k timo pri nova eksplodo — mirigita k indignita estis ja ankoraŭ la publika opinio. Kiu ja volas riĉiĝi per milito — tiel pensis la meznombraj gazetlegantoj. Kaj en la demandado unu el la usonaj senatanoj mal-

(1) Z. konstruis la mond-entreprenon Vikers. La angla reĝo nobeligiis lin.

aprobe konstatis, ke la grandaj armilfabrikoj liveris municion k militilojn al ĉiuj landoj de l'mondo, k ke ĉi tiuj per ili reciproke al militis k mortigis sin.

Dume naskiĝis la diktatorecoj; dume la senarmigita lando (dank' al « humanaj » landoj, kiuj « ŝatis la pacon ») rearms. Kaj kun daŭre pliigantaj fortoj k rapido. Denove oni bezonis ŝtalon k — denove prezentigis okazo por gajni per ŝtalo (k krudmaterialoj de sama militvaloro) oron.

Kiu konis ankoraŭ la faktojn de Brelsford? Ĉu ili ne fariĝis malnovigintaj forĵetaĵoj? Kaj la rezultoj de la usona esploro, sekvita de samspeca enketo en Britio? Kiu havis emon k tempon, enprofundiĝi en tio dum la preterpasantaj okazaĵoj? Ĉio-ĉi estis puŝata en la fundon, poste duone forgesata; fine ĝi troviĝis nur en la subkonscio de kelkaj.

Oni ja ne povis nenion fari, dum la diktatorecoj gigante rearmadis. Cetere la venkintoj el 1918 tiurilate neniam nenionfaris, sed tio nun daŭre iris laŭ progresia skalo: antaŭe ĉiujare pli da mono por armado, poste ĉiumonate pli, ĉiusemajne pli. Ne plu en la mallumo staris la grandaj trustoj de l'armil- k municifabrikistoj, de l'gasmasko-fabrikistoj, de l'ĥemiaj milit-laboratorioj! **Kio momenton** nomiĝis maldeca, malmorala, hontiga, tion nun oni konsideris kiel savon de l'mondo. Oni bezonis, urĝe bezonis ilin. Se ili ne ekzistus, kun ĉiufoje novaj, pli bonaj (!), pli efikaj militiloj, kion oni do povus fari? En plena lumo ili nun staris, kiel savantoj, kiel liberigantoj. Ne nur ĉiuj iliaj iamaj krimoj estis forgesitaj, ili estis ankaŭ **pardonitaj**: ja ne estis **malbono**, sed estis **bono**, kion oni alportis.

Kiu ankoraŭ parolas pri rilatoj, kiujn povus havi registaranoj kun la milita industrio de iu lando! Kiu ankoraŭ pensas pri kaŝlaboro por rikolti oron el estonta mondbuĉado! Goja, serena, danka oni estas, ĉar ĝi ekzistas, kreskas k floras, la milit-industrio kun ĉiuj siaj formoj k branĉoj! Poste eble, kiam la afero okazis, oni denove pensos aranĝi enketojn k fari sankte indignajn mienojn pro la milionuloj, kiuj gajnis sian oron per ŝtalo k hejt-oleo k kio ajn. Sed la hodiaŭo ne estas tiu momento. Hodiaŭ ĉio estas forgesita k pardonita.

Kaj eĉ en la malgranda Nederlando oni ne plu aŭdas vorton kontraŭ la privata milit-industrio, kiu pro la plifortigo de l'armado ĉiufanken devis esti pli vastigata. Kiel ja povus esti aliel? Krom laboro, i.a. al metallaboristoj, ĝi alportas profitegon al entreprenistoj k akciuloj.

W. L. Oostingh en « Vredesdaad ».
Tradukis E. Stoffels.

Novajo sur la libromarkato!

NEGULINO

k aliaj fabeloj de fratoj Grimm
en la klasika traduko de KABE.
96 paĝoj grandformataj; kun 35 bildoj
de K-do Langeberg.

Prezo: 18.— fr.fr. Ce S.A.T.
(Nederlandanoj mendos
ĉe F.L.E.-libroservo)

Diskutejo

LA BATALO INTER ĈIELO K TERO

Foje-refoje mi legis la skribaĵojn de la piulo P. P. Dupont-Durand k ridis voĉe. Mi ridis ne pri lia insulta tono rilate al SAT k la sendianoj, kian multajn religiajn ŝafidojn pro humiliĝo ne aŭdacas diri, sed pri lia primitivula naivo. Efektive tamen ĉi estas tute ne la unika ekzemplero. La religia opio ankoraŭ ŝvebas en la cerbo de miloj k miloj da ortodoksaj, protestantaj, katolikaj ktp. homidetoj.

P. P. D. D. per sia skribaĵo donas motivaĵon por diskuti temon, kiu laŭ sia karaktero ĉiam prezentas apartan interesoŝon por ĉiu pli malpli progresema k racie pensanta spirito. Tio pli ke lia letero enhavas kelkajn respondindajn punktojn. SATano 21241 ne tuŝis principe k pli profunde la problemon, sed li simple kulpiĝis al P. P. D. D. pro nesufiĉa kono de la biblio. Kaj T. Aldworth elmetis sian opinionon.

La batalo de la teranaro kontraŭ la ĉielo estas malnova. Tio malnova, kiom la aspiro de dio altrudi sian absolutismon sur la tero. Tio konfirmas eĉ Davido, la psalmisto, en unu el siaj skribaĵoj. Tamen ne tio gravas, sed la fakto, ke tia batalo ekzistas. Kaj ĝi estas multsignifa. Ĉar ĝi nekonteble montras, ke dio, post miloj k miloj da jaroj, ne ankoraŭ sukcesis trudi sian volon al la kreaĵo, kiun li propradezire modelis (laŭ Moseo, kompreneble).

Ĉiuj kristanaj apoloĝistoj bazas siajn predikojn alĉielajn sur tekstoj el la biblio, malnova k nova testamentoj. Per la kristanoj tiu libraro estas grava faktoro, k ĉi eĉ atribuas al ĝi dian originon (ĝi estas skribita de la profetoj laŭ inspiro de dio mem). Sed fakte ĝi entenas svarmon da senformaj absurdaĵoj, mistifikaĵoj, naivaĵoj k fantaziaĵoj, kiuj evidente ne eltenas elementan kritikon. Kiel seminariano, kiun oni pretendis fari pastro, mi dum kvar jaroj fundamente, de komenco ĝis fino, trastudis, analizis k glosis la biblion en la antikva greka k latina lingvoj. Ĝi pli mi legis, des pli mi konvinkiĝis pri ĝia fantazieco k ĝia arbitreco. Se mi estus agnoskinta verajn la skribaĵojn en ĝi, mi devis nenre malakcepti ĉiujn prisciencajn konojn, kiujn oni paralele instruis al ni en la seminario.

Ĉu en la komenco de la mondo ekzistis nur unu aŭ pluraj lingvoj, tio ankoraŭ ne estas definitive konstatita. La opinioj de la lingvistoj k filologoj diagonale diferencas. Ĉiuokaze la legendo pri la « Babela konfuziĝo » estas neniel akceptebla. Per tio dio mem stampas sin kiel malbenintenculon, kiu aspiras estigi kaoson staton sur la tero, por povi konservi sian ĉielon. « La Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero », sed li neniel sukcesis konfuzi la cerbon de la tuta teranaro. Ĉu P. P. D. D. k eventualaj samopiniantoj volas pluiĝi tiun lingvan konfuziĝon, malagnoskante unu solan universalan komprenilon?

La kunlaboro inter la kruco k la martelo, kiujn P. P. D. D. unu-emblemigis, ne estas lia iniciato. Jam de du-tri jaroj katolikoj k komunistoj (tria-internaciaj) etendis al si la manojn. En Moskvo eĉ antaŭ monatoj oni eliminis la ateistan katedron. Bedaŭrinde nur, ke Marks ne estis samtempulo de Jezuo Kristo, por povi oficialiĝi tiun sanktan aliancon. Vere por religuloj la kruco estas simbolo de martireco. Sed en la nomo de tiu sama kruco la eklezio faris nekalkuleblajn krimojn. En la nomo de tiu kruco la inkvizicio torturigis milojn k milojn da defituloj, kiuj provis diskompaktigi la religian nebulon. Por konservi sian privilegian situacion sur la tero, ĝi perforte rekomendis al popolo transmondan, ĉielan vivon. Kaj dio indiferente, pasive k epilepsie observas tiun spektaklon!

Por senbazigi la tezon de la sennaciistoj pri esperanto kiel mondlingvo, P. P. D. D. apogas

sin sur la « fakto, ke Lenin diris, ke Stalin ripetis, ke iam la lingvoj kunfandiĝos en unu solan, neniel kontraŭas al la biblia diro ». Eble dio per la buŝo de L. k St. promesas per miraklo forigi la konfuzon sur la tero, kiun li intence estigis. Kial do li (dio) volas ludi tian komedion?

Kvankam la ekleziuloj pledas por transvivo k neas la surteran, ili estas tamen same fervoraj kiel patriotoj. La batalo inter la ĉielo k tero transportiĝas sur la terenon de la patrio. Kaj dio ekludas la rolon de naci-defendanto. (Kompreneble li protektas la patriotojn kun pli forta armeo.) Tial por patrioto la paradizo estas la patrio. Al la malriĉularo oni rekomendas la ĉielon. La prediko de Kristo pri komuna patrio restas fikcio. Male, anstataŭ kristana amo interfrata, piuloj kiel P. P. D. D. asertas « bataladi kun Stalin por ekstermi ĉiujn herezulojn ». Indulgu, dio, la eterbulojn, ĉar vi mem kreis ilin!

Mi miras, ke konsciulo kiel K-do Aldworth povus diri, ke « la religioj faras multon bonan per instruo de bona konduto k moralo ». La mondo delonge gustumas la fruktojn de religia moralo k edukado, kiuj emigas nin al rezigno k malinteresiĝo je ĉiuj mondproblemoj. La religia moralo estas falsa! « La praktika helpo al la bezonantoj » fare de eklezianoj estas evidenta kontraŭdiro al ilia prediko, ke ju pli granda la surtera sufero, des pli granda la ĉiela feliĉo. Por esti konsekvencaj la eklezianoj devas elekti unu el la du paradizoj: aŭ nur la ĉielan aŭ nur la surteran.

Ie en la biblio estas skribite, ke dio loĝas en la « naŭa ĉielo ». Certe la verkinto havis malbonajn astronomiajn konojn. Dante simbole prezentis lin en la lasta cirklo, en formo de radianta lumo. La herooj el « Aelita » de A. Tolstoj ĝis nun atingis nur Marson. E. Dodge elkalkulis, ke « Flugado Alimonden » estas realigebla praktike per raketo post kelkaj jarcentoj. Do ankoraŭ longe dio restos izole trankvila en la « naŭa ĉielo », por amuzi sin en la paradizo per virgaj madonoj. La surteraj piuloj ne ludu la rolon de eŭnukoj!

K-do E. Lanti en « Vortoj » (p. 31) vere rekomendas la biblion, krom el lingva vidpunkto, pro la modela Zamenhofa traduko, sed li ankaŭ « volonte rekomendas ties legadon al homoj, kiuj volas akiri la firman konvinkon, ke la religioj sin bazas sur fabeloj porinfanaj ». Vere, se oni atente, stude k kompare legas la biblion, oni ne malfacile deduktas konkludon pri ĝia fabeleco. Mi konfesu, ke kiam mi k kelkaj dekoj da samaĝuloj transpaŝis la sojlon de la seminario, ni ĉiuj estis religiaj, kredantaj en dio k ardis pro deziro asimili la sanktajn skribaĵojn. Post kvarjara studado k glosado de la biblio k aliaj sanktaj libroj nia kredo iom post iom forvaporigis k ni mem nekomprene demandis nin, ĉu vere ni estis tiel stultaj por kredi al iu fikcio kreita de la homo mem. Mi ne erarigas dirante, ke 80 0/0 el ni forlasis la seminarion kiel ateistoj, pasivaj aŭ aktivaj, kaŝaj aŭ malkaŝaj.

La plejparto el la religuloj ne legis la biblion, sed nur fragmentojn el ĝi. Kaj la legintoj faris tion meĥanike, aŭtomate, ne kontrolante racie nek submetante al objektiva kritiko la koncernajn priskribaĵojn. Aliel ili certe venus al la sama konkludo, al kiu venis 80 0/0 el miaj samseminarianoj.

Atente legu la biblion! La batalo inter ĉielo k tero daŭros!

Pario (20253).

AL K-do MIEN v. RIESSEN (20502) (1)

Mia artikoleto « La ŝafaro » (en januaro 1938) ne estas ia akre-moka verkaĵo. Jezuo Kristo mem nomis sin ŝafo k tra la tuta Biblio « ŝafo » signifas ion belan, bonan, mildaniman. Mi tute ne povas kompreni, kial vi min tiel riproĉas pro tio, ke mi nomas la anojn de Dio

ŝafoj. Ĉu ne La Dio mem nomas sin nia paŝtisto k nin ŝafoj? Sekve per via artikolo vi ne trafas min, sed la anojn de Dio, Dion mem, Jezuon Kriston k la Vortojn de Dio, nome la sanktan Biblion, el kiu mi legu k komentu :

« 34 — La virinoj silentadu en la preĝejoj ; ĉar ne estas permesate al ili paroli, sed ili submetiĝu, kiel ankaŭ diras la Leĝo. 35 — Kaj se ili volas lerni ion, ili demandu al siaj edzoj hejme ; ĉar estas honte por virino paroli en la preĝejo. » (I. Korintanoj, 14.)

Eble la Biblio pravas pri la virino, k eble oni fariĝas konservativulo. Eble oni maljuniĝas k prudentiĝas pri la virino.

« 12 — Ĉar estas eŭnukoj, kiuj estas naskitaj tiaj el la patrino ventro ; k estas eŭnukoj, kiuj estis eŭnukigitaj de homoj ; k estas eŭnukoj, kiuj eŭnukigis sin pro la regno de la ĉielo. Kiu povas tion akcepti, tiu akceptu. » (Sankta Mateo, 19.)

Ĉi tie Jeŭso pledas por forĝlandigo « pro la regno de la ĉielo ». Granda fanatiko kelkfoje estas religio. Multegaj miloj da viroj sur la tero forigis siajn testikojn k malbeligis k detruis sin pro tiuj vortoj de Jeŭso.

« 26 — Kaj mi trovas, ke pli malbona ol la morto estas la virino, kiu estas kaptito, k kies koro estas reto, k kies manoj estas katenoj ; kiu plaĉas al Dio, tiu sin savos de ŝi, sed pekulo estos kaptita de ŝi. 27 — Jen, kion mi trovis, diris la Predikanto : oni devas kunigi unu fakton kun alia, por veni al konkludo. 28 — Jen, kion ankoraŭ serĉis mia animo k ne trovis : viron unu inter mil mi trovis, sed virinon inter ĉiuj mi tute ne trovis. » (La Predikanto, 7.)

La verkinto opinias, ke la virino estas malicajo k malbonajo. Sed ĉu ŝi ne estas tre bona, ĉar ŝi permesas, ke la viro (kun Dio) tiel krude ofendas ŝin ? Ĉu ne la virino naskas la viron, nutras lin, edukas lin, amas lin, helpas lin ? Multaj artistoj estis k estas pentrantaj, skulptantaj k prikantantaj tion, sed la Biblio... Sed eble la Biblio pravas koncerne la virinon. — Cetere, rido sanigas. Do sufiĉu pri eŭnukoj k virino.

Klas Karlsson (20059).

(1) Vd. n-o 475 (p. 45).

Bumrange (1)

La guidantaro de la nun fiaske likvidiganta I.P.E. sciigis « private » — sed maltrafe — al la « komunistaj esp-istoj », ke « Sur Posteno » ne plu povos aperi. Tiu sciigo memorigis nian kunlaboranton pri versaĵo, kiu aperis en la n-o 33-a de tiu mortinta gazeto. Niaj legantoj certe sentos kiel ni la humoron, kiun akiris kun la tempo la galajo de Bert Turner el Edinburgo, la aŭtoro de ĉi subaj versoj, kiujn li destinis al nia K-do Lanti.

La plena ekstremo de l'barba blankul' Montriĝas en verk' « Herezaĵo ».

Jen plua atesto, ke tiu aĉul'

Troviĝas jam nun sur postajo.

Sed tute ne ĝenas al IPE-anar'

La ranca vomaj' de l'kreteno.

Ni sovetamikoj en plensolidar'

Viciĝas en front' « Sur Posteno!! »

Dume Lanti ĉiam staras vigle k nun B. Turner « troviĝas sur postajo », ĉar li ne plu disponas je « Sur Posteno » por elmontri sian vere grandan... poentan talenton...

(1) Bumrango estas jetilo, kiun uzis la aŭstralaj indiĝenoj k kiu revenas al la jetinto, kiam ĝi ne trafis la celon.

Imprimé en Belgique.
Editeur resp. : L. GLODEAU,

FRAKCIOJ

ANARKISTA FRAKCIO

Frakcianoj, ne forgesu nian frakci-kunvenon dum la SAT-kongreso en Kopenhago, la 9-an de aŭgusto, je la 9-a horo. Ciu frakciano, kiu havas specialan proponon aŭ deziron rilate nian laboron, sendu ĝin al la sekretario, por pli facile prepari antaŭe la tagordon de la kunveno. La membraro kreskis iom pasintjare, sed certe multaj liberecanaj SAT-anoj ankoraŭ ne frakcianiĝis. Malgraŭ la faŝista teroro en la mondo necesas unuigi la liberecanajn fortojn al komuna bataŭo por niaj ideoj. En la francaj koncentroj troviĝas multaj el niaj K-doĵ, kiuj en siaj leteroj priskribas la teruran mizeron tie regantan. Ili petas esp. literaturon, librojn, broŝurojn, novajn k malnovajn gazetojn k. s. Frakciano, havanta ion por sendi, povas ricevi adresojn pere de la Frakcio. Post la kongreso aperos 3-a n-o de « La kompasoj ». Ni deziras mallongajn sciigojn de diverslandaj frakcianoj. Ĉe ni kuŝas ankoraŭ granda kvanto de la broŝuro « Al la junuloj » (Kropotkin). La prezo estas 6.— fr. fr., sed frakcianoj ricevas esceptan rabaton, se ili mendas la broŝuron al la sekret. J. Ström, Bagarmossvägen 13, Enskede 2 (Svedio).

SENNACIISTA FRAKCIO

La Sennaciistoj, laŭ la enhavo de iu periodaĵo, estas tiom fortaj en SAT, ke ili efektive regas la organizon. La Sekretario de la Senn. Frakcio povas konkludi el tio nur, ke la sennaciistoj estas tiel fervore okupataj en tiu « regado », ke ili ne havas tempon por dediĉi al la propra frakcio. Dum la pasinta jaro nia frakcio ne progresis. Preskaŭ neniu taris tiajn klopodojn, kiajn oni povas publike anonci kiel aktivan laboron. Organizita laboro kontraŭ la plej terura malbono en tiu ĉi mondo — naciismo, restis nefarata. Kiu pro tiu delikto estas kulpa? Ni konsideru la apologion de la Sekretario.

Parto de la sekretaria laboro ne estas konstante k daŭre instigi la frakcianojn al aktiveco. Dum du jaroj li tion faris, sed en la tria jaro, pro multe da loka laboro k ion grava malsano li lasis la iniciaton al la membraro. Bedaŭrinde neniu kontribuis per artikoloj, leteroj ktp (eĉ post kelkaj alvokoj) al la Sennaciista Bulteno. Tial, kvankam ni posedas la teknikajn k financajn rimedojn por ĝia publikigo. « S. B. » ne povis aperi. Krom unu-du honorindaj esceptoj (ekz. K-do Wijnman el Hago), neniu alsendis materialon por la kelkfoje anoncita « Ekspozicio de Naciismo ». La nuntempa komaa stato de la Frakcio laŭ la sekretaria opinio estas rekte kaŭzita de la indiferenta sinteno de ĝiaj membroj. Multaj sennaciistoj troviĝas en SAT, — tion oni ne povas nei. Ili do agu konsekvence farante pozitivan laboron en sia frakcio. Fr. kunveno okazos en Kopenhago : Tagordo — sekretaria raporto ; financa raporto ; bulteno ; elekto de oficuloj : « Kio estas Federacia Unuiĝo ? » lekcio de B. Roberts. Ĉiuj sennaciistoj k simpatiantoj estas kore invitataj ĉeesti.

B. Roberts, 1. Caister Ave., Whitefield,
Manchester (sekt. J.)

Membro-Informilo

Nov-aligiĝis en junio 1939 al SAT : en Nederlando 11, Francio 5, Danio 2, en Belgio, Norvegio, Polio k Svedio po 1, sume: 22 membroj.

Adresŝanĝo : La Peranto de la 14-a Roterdama sekcio, K-do C. J. Kroon, loĝas nun: Brouwerstr. 33 b (O).

En la 8-a Roterdama sekcio K-do A. de Bes, Verboomstr. 251, anstataŭas K-don A. Pinster.

Se iu falis en puton, ne jetu vin en la puton por savi la falinton.

KONFUĈIO.

LA SENNACIECAJ GEEDZIGOJ PLIMULTIGAS !

Oni informis nin pri la geedziĝoj de K-do BOULOISEAU (Tours, Francio) kun K-dino KRATZ (Voorburg, Nederlando).

Ili interkonatiĝis lastan jaron en Bruselo dum la kongreso.

Kaj de

K-do J.W. PRENT (Roterdamo, Ned.) kun K-dino E. MOON, nia perantino por Grand-Londono.

Ankaŭ ili interkonatiĝis okaze de SAT-kongresoj.

Ni gratulas al la novaj paroj, modeloj pri praktika sennacieco !

Recenzejo

Unuope ricevitajn librojn ni mencias, duope ricevitajn ni recenzas.

Elin Pelin : Kvar rakontoj. Tradukis el la bulgara At. D. Atanasov-Ada. Havebla ĉe la tradukinto (str. Gladstone 48, Sofia). Prezo : 1 resp. kupono. 31 paĝoj. 12x15.5 cm.

Bone prezentita rakontlibreto, kun desegnoj entekstaj. Pelin estas en Bulgario tre konata, ŝatata beletristo.

Célestin Rousseau : Amo, fonto de Vivo. Poemo originale verkita. Esperantista Centra Librejo, Paris 6. Prezo : 3 fr. fr. 16 paĝoj. Amorememoj de maljunulo. Solene sonantaj ritmoj en klasika formo.

Por getendumantoj!

La nordregiona komisiono de la Naturamikoj organizis daŭran tendaron en la belega urba parko de sportoj en Rubezo (Roubaix), Norda Francio, proksime de Lilo (Lille), de majo ĝis novembro 1939, por getendumantoj, kiuj deziras viziti la rimarkindan ekspozicion de Socia Progreso en Lilo k Rubezo. Ili trovos tie vastan terenon, pajlon, biciklejon, trinkakvon, duŝojn k necesejojn. Ankaŭ grandaj dormejoj estas instalitaj, sed necesas kunporti kovraĵojn k dormsakojn. Facila provizumado. De 12-a ĝis 15-a de aŭgusto okazos sur tiu tereno la internacia tendaro « Socia Progreso », organizota de la Naturamikoj, k internacia esperantista kunveno. Partoprenontoj bonv. antaŭe anonci sin al la regiona sekretario de Naturamikoj, I. Coutellier, 7, rue des Arts, Roubaix (Nord), Francio.

Korespondado

3-linia anonceto kostas 6.— fr. fr.

NEDERLANDO

24-jara butikservisto dez. kor. kĉl. pĉt. Resp. garantiata. Adr. : E. Franken (post 1-a de aŭgusto), Drienerweg 102, Enschede.

K-do Joĉjo Cornelisse, v. Brakelstr. 100, Hago, dez. koresp. laŭeble pri geografio, filozofio k afrikaniŝmo kĉl K-dinoj en aĝo de 18-50 jaroj. Certa resp.

FRANCIO

Dek unu lernantoj el kurso en koncentrojo de hisp. rifuĝintoj dez. kor. kun Gek-doĵ el Francio. Adresu ĉion al : Emilio Bagües, Baraque 83 (E), Bram (Aude)

Mi dez. kor. per PK kun ĉl. K-doĵ. Resp. gar. Touya, 5, rue Chandon, Tulle (Corrèze). FOLIO

K-do Alb. Piotrowski loĝas ekde 1. aŭg. Krupnicza 16. m. 11, Krakow (of. poŝta konto 407.743).

Kiu novas informi nin pri la sorto de K-do W. Lekowski, antaŭe en Varsovio, poste en Besse-sur-Issole (Francio) ? Bonvolu skribi al SAT.

Arts Graphiques, 201, ch. de Haecht, Brux.-3
Gérant : J. Léchevin, 56, rue Robiano, Brux.-3

